# ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO

**N-ro 1 BULTENO DE ATEO Aprilo 1988**



**FONDINTOJ**: S-ro Ralph Dumain kaj S-ino Minerva Massen, Usono, 1987

**PREZIDANTO & REDAKTORO**: Ralph Dumain; 1629 Columbia Road, N.W.; Apt. 615; Washington, DC 20009; USA; tel. (202) 332-0589.

**VICPREZIDANTO**: Minerva R. Massen, 855 La Playa #458, San Francisco, CA 94121-3255; USA; tel. (415) 668-7605.

**SEKRETARIO-KASISTO**: S-ro John B. Massen (vidu adreson de Minerva).


**INFORMPETOJ KAJ KORESPONDADO**: Vi rajtas kontakti iun ajn estraranon. Se vi anticipas ian ĝenon aŭ persekutadon pro ateisma agado, bonvolu mencii bezonatajn apartajn aranĝojn por vi. Eventuale sendu pagojn al John Massen.

**MANUSKRIPTOJ**: Se eble sendu molan diskon je 5 1/4" en formato de IBM PC/XT/AT (kun sufiĉaj respondkuponoj aŭ poŝtmarkoj por resendo de la disko se vi bezonas) al Ralph Dumain. La teksto estu en formato ASCII (kun supersignoj tuj post la ĝustaj literoj), Word Perfect, aŭ XyWrite. Alie, sendu tajpitajn manuskriptojn al Minerva Massen, preferinde en elredaktita kopipreta formato. Konservu ĉe vi kopion de via manuskripto. Aŭtoroj rajtas uzi pseŭdonimojn. Ni senhezite akceptos tradukojn el klasikaj aŭtoroj kie ne ekzistas kopirajta problemo. Pri kopirajthava materialo, provu gajni permeson de la aŭtoro aŭ eldoninto kaj sendu al ni kopion de la skribita permeso. Ni ne akceptos porreligian propagandon por niaj publikaĵoj.

## LA CELOJ DE ATEO

1. *Kunligi Esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.*
2. *Disvastigi Esperanton inter ateistoj.*
3. *Defendi propran egalrajtecon kaj kontraui trudadon de religio en neutralajn Esperanto-grupojn.*
4. *Instigi ĉe Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe ne-religiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.*
5. *Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.*
6. *Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn sociajn problemojn.*

## MESAĜO DE LA PREZIDANTO

Saluton, Esperantistoj eksterreligiaj, ĉu vi nomas vin ateistoj, liberpensuloj, raciistoj, materiistoj, eĉ agnostikuloj! Mi bonvenigas vin al la menssana mondo de ateista Esperantujo. Tiuj el vi kiuj partoprenis nian fondkunsidon ĉe la Universala Kongreso en Varsovio jam havis la okazon audi mian voĉon surbendigitan kaj renkonti Ges-rojn Massen. Mi kaj du aliaj kunvenis ĉe nia fondkunsido ĉe la kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko en Vaŝingtono en julio 1987. Oni diskutis la bezonon kaj celojn de ateista grupo, instigite de la ideoj de S-ro Dumain. Multaj sentas neceson por starigi alternativon al la multaj religiaj Esperanto-asocioj kaj por voĉi proprajn koncernojn por racia humanisma mondo. La partoprenintoj multe entuziasmis kaj multaj esprimis deziron verki kaj traduki artikolojn por eventuala revuo. La gekunvenintoj en Varsovio elektis la nomon ATEO por la asocio. Do jen ATEO, nia donaco por la jubilea jaro!

Ni invitas kunlaboron kun la neŭtrala kaj la neneutrala movado. Aparta ateisma revuo kaj aparta, sendependa ateisma asocio por la tuta Esperanto-movado estas avantaĝaj por ĉiuj progresemaj Esperantistoj. La ateisma heredaĵo de Esperanto plejparte vivas per SAT inkluzive de ties Liberpensula Frakcio. Mi esperas ke ĉiuj ateistaj SATanoj partoprenos en ATEO. Vi povas helpi konstrui la historion de ateisma agado en SAT kaj de la Liberpensula Frakcio. Ni celas ankaŭ bonajn rilatojn kun UEA. Ni ne gajnis kunvenĉambron por nia kunsido en Varsovio sed ni esperas gajni ĉambron por ĉiuj venontaj Universalaj Kongresoj. Do, ĉiuj, helpu disvastigi raciismon en Esperantujo kaj la mondo!

## KIAL NI BEZONAS ATEISMAN ASOCION?

Multaj korespondantoj jam demandis al mi, kial oni bezonas ateisman asocion, kion komunan dividas ateistoj krom ateismon, ĉu ne ateismo estas negativa koncepto, kial ni ne nomu nin "liberpensuloj"? Mi volas nun komenti pri mia propra intereso pri ateismo ĝenerale kaj specife en la Esperanto-movado.

Ĉar neniam influis mian mondkoncepton religia instruado, mi neniam taksis religiojn seriozaj aferoj kaj ne devis konscii aŭ pensi pri ateismo. Pensi konscie pri ateismo estus same pleonasma kiel nomi min oksigenisto ĉar mi preferas spiri oksigenon ol cianidon. Mi okupadis min pri filozofiaj demandoj, sed temis plejparte pri konsiderado de diversaj modeloj de la mondo kaj ne prizorgo de argumentoj por kaj kontraŭ dioj kaj religioj. Ateismo en si mem ne estas kompleta filozofio, kaj mi preferus konstrui pozitivan kompletan materiisman mondbildon, pripensante epistemologiajn, ontologiajn, kaj logikajn demandojn.

Mian sintenon ŝanĝis la ŝoka politika degenero de Usono en la 1980aj jaroj. Unu jaron antau la komenco de la aktuala Usona regimo, min ege frapadis la malhazarda sistema promociado de la plej aĉaj, reakciaj, malraciaj filozofioj kaj ideologioj. La aktualan faŝisman tendencon en Usono grandproprocie subtenas organizitaj Kristanaj faŝistoj, kiuj instigas min kaj multajn aliajn al militanta baraktado kontraŭ religio same kiel kontraŭ aliaj reakciaj ideologioj.

Kelkaj personoj menciis al mi ke nia ateisma agado konsistu ne nur el negativa kritiko de religio sed ĝi emfazu pozitivan koncepton pri la mondo kaj vivo kaj la deziron por paco kaj justeco. Kelkaj interesiĝas pri ateisma agado aparte aktuale reage al la reganta etoso de politika kaj ideologia regreso.

Miaopinie, la ĉefa motivo diskuti religion aŭ ateismon estas emfazi la klerecon, klarecon kaj neprecon de materiisma pensado por progreso en la kvalito de la vivo. La mondo malheliĝas kaj regresas al la plej sovaĝaj agoj, politikoj, kaj filozofioj. La subteno de pozitivaj humanismaj valoroj necesigas senindulgan negativan sintenon pri religia kaj mistifika pensado.

La ĉefa bezono por ateismaj organizaĵoj en Usono estas krei politikan forton por oponi la dominadon de religio en oficialaj aferoj en la registaro, en la publikaj (nereligiaj) lernejoj, tute apartigi la religion de subteno de la registaro, kaj malebligi la rajton je religio kiel pravigon por rasismo, seksismo, misuzado de infanoj, ktp. Ataki negativaĵojn estas pozitiva ago kaj oni devas defendi propran ekzistorajton kaj propran liberecon kontraŭ la fortoj de mallumo, reakcio, kaj maljusteco.

Mi ekspliku mian intereson pri ateismo en Esperantistaj rondoj. Je la pozitiva flanko,

mi supozas ke la plejmulto de Esperantistoj ne estas elitanoj, ke multaj Esperantistoj tra la mondo eĉ loĝas en izolaj putraj lokoj sub domino de religia etoso, kaj ke tiuj bonvenigus moralan subtenon per kontaktoj kun ateistoj el aliaj mondpartoj. Eble por la elito la angla lingvo estos la ĉefa lingvo, sed ekzistas aliaj homoj kiuj havas apartajn interesojn pri sociaj, kulturaj, kaj filozofiaj temoj, por kiuj Esperanto estus taŭga komunikilo.

Aliflanke, multloke en Esperantujo (certe en Usono) la religia influo estas tre forta. Oficiale la plejmulto de lokaj Esperantaj grupoj kaj ankaŭ landaj kaj internaciaj asocioj estas neŭtralaj. Tamen majoritato aŭ aktiva minoritato kiu dividas komunan mondbildon povas determini la etoson de Esperanto-grupo kiun devas elteni la ceteruloj. Bedaŭrinde, Esperantujo (certe en Usono kaj la anglaparolanta mondo) estas rubujo por ĉia stranga mistifika doktrino. Temas pri la troa influo de la Bahaanoj, la spiritistoj, la Katolikuloj, Kristanoj ĝenerale, adeptoj de babilinta Japana aŭ Finna profetino, kaj adeptoj de aliaj diversaj strangaj filozofioj, mistikismoj, religioj, kultoj, kaj sektoj.

Ekzemple, multloke en Usono Esperantistaj kunvenoj kutime okazas en Bahaanaj centroj. Ankaŭ, la plejmulto de Usonaj Esperantistoj estas tre konservativaj homoj kulture, socie, kaj politike. La etoso estas naŭza.

Pro la supre menciitaj faktoroj, estas facile libere diskuti kaj altrudi proprajn mistifikajn pensojn, sed estas preskaŭ tabuo serioze, intelekte, klere, realisme, aŭ kritike diskuti realajn aferojn en la mondo, aŭ inteligente diskuti aŭ kritiki la Esperantan subkulturon mem. La raciaj homoj, kritikemaj homoj, la homoj kiuj profunde esploras kaj konscias pri la reala mondo estiĝas ofte tre nekomfortaj. Ateistoj pro timo de ofendigo ne emas esprimi proprajn pensojn pri religio, pri ateismo, aŭ pri aliaj temoj kiuj ofendus la konservativulojn. Do oni silentas kaj lasas la religianojn libere esprimi siajn frenezaĵojn. Tio ne estas justa situacio. Tio estas malegaleco kaj oni devas kontraŭi tiun tendencon.

Mi spertis en neŭtrala grupo proponon de varbado en preĝejoj aŭ ĉe religiaj grupoj. Ĉu iam oni sugestis ke oni varbu ateistojn por Esperanto? Ne, ne en Usono. Ĉu oni rajtas antaŭsupozi ke Esperanto havas logikan konekson kun religio? Ĉu religianoj estas pli taŭgaj, moralaj, interesaj homoj ol ateistoj? Tiaj sugestoj estas insultoj!

Do min instigas la konservado de neŭtraleco aŭ almenaŭ pluralismo. La Bahaanoj, spiritistoj, kaj disaj religiaj frenezuloj ne rajtas trakti Esperanton kiel sian privatan proprajon.

Ni bezonas ankaŭ ateistajn poetojn, fikciistojn, eseiistojn por kontraŭpezi la influon de kvakeroj, sepatagadventistoj, spiritistoj, kaj similaj stultuloj en nia literaturo.

Ni ankaŭ esploru la kaŭzojn de la interkonekso de religia influo kaj la malrealismaj sektismaj aspektoj de Esperantismo. La mistifikuloj-stranguloj havas fragmentecan mondkoncepton pro kio ili enhejmiĝas en la Esperanto-medio kiu ankaŭ suferas de fragmenteca kaj striktvida mondkoncepto malgraŭ ĝia sinflata universalisma pretendo. Esperanto estas plejparte eskapismo, same kiel religio estas eskapismo. Do ne estas surprizo ke la etoso de Esperantistaj rondoj estas tiom banalaj kaj tiom eskapemismaj kaj tiom religiaj. Oni devas ŝanĝi tion. La religia etoso de Esperantismo mem, la misiisma kaj utopiisma sinteno al Esperanto malhelpas racian agadon por Esperanto kaj dogmigas kaj banaligas Esperantan kulturon. Mi intencas verke plu esplori tiun temon.

Jen miaj motivoj. Vi probable ne konsentos ĉiujn. Resume, ni bezonas ateisman grupon por plifortigi ateisman influon, subteni Esperantistojn-ateistojn, kaj aserti nian propran ekzistorajton kaj nian meritatan lokon en Esperantujo. Ĝis nun ekzistis nur la Liberpensula Frakcio de Sennacieca Asocio Tutmonda. Ni volonte kunlaboros kun ĝi sed ni bezonas ateistan asocion kun propra revuo por la tuta Esperanto-movado.

## PRI TERMINOJ

Multaj skribe aŭ konversacie debatis la meritojn de la terminoj "ateismo," "liberpensismo," "agnostikismo," ktp. Pluraj pensas ke la vorto "ateismo" estas tro "negativa" aŭ incita. Eble la vorto "ateismo" tro sugestas dependon de religio (eĉ se kontraŭa) ol alternativan sendependan mondkoncepton. Oni konsideris ankaŭ ĉu la tre evidenta titolo "ateismo" invitus persekutadon de eventualaj membroj aŭ abonantoj. Aliaj kontraŭe asertis ke la plej taŭga termino estas "ateismo," ĉar ateismo temas pri pozitiva doktrino sen

la bezono de Dio. Plue, estus malkuraĝe ne uzi tiun vorton nur pro la malabrobo de aliaj.

La vorto "liberpensismo" estas milda sed malĝusta, nepreciza, malkuraĝa eufemismo. Ĝi enlasas troan ambiguecon kaj nedecidemon pri onies starpunkto.

Mi persone ne akceptas la koncepton de agnostikismo, ĉar ĝi baziĝas sur dubo. Mi preferas senkompromisan materiisman mondkoncepton. Mi preferus nomi min "materiisto" (kvankam ne ĉiuj ateistoj estas materiistoj). Tamen pri religio mi ne povas trovi pli bonan terminon ol "ateismo." Mi ne timas la "negativan" etikedon; fakte, unue mi volis nomi nian grupon "Kontraŭ-Religia Esperanto-Asocio" aŭ io simila, do per nomo eĉ pli "negativa" ol "ateismo."

Eble la terminoj "ateismo" kaj "liberpensismo" kaj aliaj vortoj ne estas idealaj, ĝustaj, aŭ puraj vortoj. Ili semantike respegulas la intelektan kaj politikan historion de Eŭropo kaj kreis ilin la historia polemiko por kaj kontraŭ religio.

En diskutado eĉ pluraj preferintoj de "liberpensismo" fine konsentis pri ĝia netaŭgeco kaj pri la supereco de la termino "ateismo." La nomo de la asocio estis decidita per voĉdono ĉe la Universala Kongreso en Varsovio.

## ĈU ATEISTOJ DIVIDAS KOMUNAN FILOZOFION?

Ne estas garantio ke ateistoj havas komunan filozofion krom ateismo, tamen, la ateistoj dividas kelkajn komunaĵojn. La respekto por racia pensado estas mem minimuma progresema faktoro. La malbonaj sociaj kaj politikaj efikoj de malraciecaj kaj malhonestaj pensmanieroj minacas honestajn homojn. La ateisma movado en Usono estas esence unuiĝanta fronto de personoj kiuj agas por defendi tiun komunan intereson. Pro tio enestas diversaj politikaj kaj filozofiaj vidpunktoj, de socialismo al faŝismo, ne ĉiuj en egalaj proporcioj. Ankaŭ ni devas konsideri nin unuiĝanta fronto. La neceso batali religian obskurantismon, diskriminacion, la danĝerajn sociajn efikojn de religio, kaj subtenon de religio fare de la ŝtato provizas fortan motivon por kolektiva agado.

Ni devos permesi la liberan esprimadon de opinioj krom la apologiadon de religio. Mi ne pretendas ke mia pensaro estas la oficiala versio de ateismo (kiel kelkaj faras en Usono). Mi vetas, ke ni esprimos plian diversecon ol la Usona ateisma movado.

## ATEISMA REVUO

La estraro intencas lanĉi ateisman revuon ĉf-jare. Ni ne diskutis la frekventecon, sed mi sugestas ampleksan kvaronjaran revuon. Tial ni bezonas ekkoni vian intereson kiel eble plej baldaŭ. Ekzistos kaj nuraj abonantoj kaj membroj de ATEO. Mi sugestas ke membroj devu pagi pli altan kotizon kaj sekve nur membroj rajtu voĉdoni pri asociaj aferoj.

Ni bezonas artikolojn de vi. Raportu pri viaj propraj spertoj de religio kaj ateismo. Raportu pri religio kaj ateismo en via lando aŭ urbo. Kiaj la rilatoj kun politiko kaj la ŝtato? Ni komparu ateismajn movadojn en diversaj landoj. Jen kelkaj aliaj temoj por diskutado: (1) disvastigo de Esperanto inter ateistoj: klopodoj, kaj rimedoj, (2) ĉu Esperanto tro ligiĝas al religio: religia propagandado por kaj en Esperanto kaj disvastigo de Esperanto en religiaj asocioj, (3) ĉu Esperanto funkcias mem kiel anstataŭa religio, (4) ĉu ateismo en si mem estas daŭra interesa temo sen konekso kun aliaj sociaj problemoj, (5) religia obskurantismo pri la lingvo, (6) paranojo kaj Kristanismo, (7) la metafizikeca menso, (8) diferenciĝo de religio kaj ateismo laŭ socia klaso.

Dum mi atendas viajn kontribuaĵojn, jen listo da artikoloj prilaborataj aŭ jam verkitaj:

**De Ralph Dumain:**

Bibliografio de ateismo en Esperanto
Historia resumo de ateismo en Esperantujo
Lingvo kaj religia obskurantismo, liberala hipokriteco, kaj la konferenco de CED
Kontraŭ obskurantismo en la Belartaj Konkursoj
Kontraŭ psikotransformismo kaj Ergoto de Bonaero
Kontraŭ LBV
Ateismo en la poezio de William Auld
Kontraŭ-religia poezio de E. Miĥalski
La freneza racio de Sandor Szathmari
Lanti pri ateismo
Religio en revuo Monato
La duflanka heredaĵo de Zamenhof
La mistifika malsano de Esperantismo

La filozofo Ludwig Wittgenstein kontraŭ Esperanto
Kie troviĝas la signifo kaj valoro de la mondo?
La profundeco de la homa intelekto
Ĉu ateismo estas kompleta filozofio?
Katolikulo Gustav Wetter pri dialektika materiismo kaj ateismo
La manipulado de ekstazo
Religio kaj hipokriteco laŭ socia klaso
Ateisma movado en Usono
La Usona Bibliozono kaj faŝismo
Religia hegemonio kaj hipokriteco en Usono
Politikaj luktoj inter ateismaj movadoj
La liberalisma trompo de Bahaismo
La idealisma ĉarlatanismo de 'artefarita inteligento'
Difino de ateismo

**Tradukoj de Ralph Dumain:**
el *Dio kaj la Ŝtato* de Mikaelo Bakunin

**Tradukoj de Ludisto Mirinda:**
el ***Dorlotita Pastro*** de Gabriel Longo
"La nokto kiam mi ekvidis la lumon" de Gina Allen
"La diluvo kaj la arkeo de Noa" el ***La Biblio de Biblioj*** de Kersey Graves
"Libera de Religio" de Anne Nicol Gaylor
"Testamento de humanisto" de Albert Ellis
"Dio kaj la Holokaŭsto" de Adolf Grunbaum

## TASKOJ ALFRONTENDAJ

Vi trovos fine de ĉi tiu bulteno demandaron. Bonvolu kompletigi ĝin kaj resendu al mi. Vi tiel helpos nin konstati intereson de la publiko kaj decidi pri asociaj aferoj. Mi ne ripetos ĉiujn tiujn demandopunktojn ĉi tie. Jen kelkaj aferoj prizorgendaj.

ATEO estas dekomence asocio neligita al UEA. Ni bezonas vian voĉdonon: ĉu ATEO restu tia, tute sendependa, aŭ cû ĝi fariĝu ne-neutrala asocio ligota kun UEA?

Ni devas decidi pri abonkotizo kaj membrokotizo kaj la problemo de nepagipovaj landoj.

Ni devas elekti nomon de nia revuo. Jen kelkaj ideoj: ***Racio, Ateisma Revuo, Ateista Mondo, Aktuala Ateismo, Ateista Heroldo, Raciisma Revuo.***

Por konstrui la historion de ateismo en la Esperanto-movado mi bezonas vian helpon. Mi havas malmultan pli ol la resumo sub rubriko "Liberpensismo" en ***Enciklopedio de Esperanto de 1933.*** Mi verkas anglalingvan artikolserion pri ateismo kaj religio en Esperantujo por Usona ateisma revuo. Ju pli da informoj, des pli bona mia verko.

Mi ankaŭ konstruas bibliografion de ateisma literaturo en Esperanto. La bibliografio ***Religia Literaturo en Esperanto*** (1970) kaj la librokatalogoj de UEA kaj SAT tre helpis pri libroj. Ĉu eble mi mistrafis libr(et)ojn? Krome mi bezonas gazetartikolojn pri ateismo en Esperanto (pli malfacile troveblajn ol librojn). Do, bonvolu sendi bibliografiajn informojn al mi. Se eble, eĉ sendu fotokopiojn.

Ni devas reklami ATEO-n. Niaj anoncoj en pluraj eldonaĵoj jam sukcesis ekinteresi plurajn homojn. Bonvolu informi viajn konatojn pri ATEO. Anoncu en viaj lokaj kaj fakaj grupoj kaj en landaj, lokaj, kaj fakaj gazetoj.

Do ni ekagu kaj malkatenu la mensojn!

---

**MEMORU: Bonvolu senprokraste kompletigi la DEMANDARON kaj poŝtekspedi ĝin al Ralph Dumain al adreso je unua paĝo.**

La estraro planos eldoni kaj poŝtekspedi ĝin je 15-a junio:
N-ro 2 de ĉi tiu Bulteno de ATEO kune: resumo de respondoj de Demandaro; kaj tagordo por la kunveno ĉe la Kongreso, inklusive provaĵo de sugestota statuto de la asocio.
N-ro 1 de nia REVUO (prova nomo).

Ni sendas **tri** kopiojn de ĉi tiu Bulteno al ĉiuj en nia adresaro kiuj loĝas en fremdaj landoj. **Bonvolu doni du kopiojn al konatoj au amikoj, kaj sugesti al ili ke ili skribos al Minerva Massen en San Francisko se oni interesiĝos en ATEO kaj volos ricevi venontajn eldonaĵojn.**

Ni petis al UEA por havi ĉambron ĉe 1988 Kongreso. Se vi ĉeestos la Kongreson, serĉu anoncon de la ĉambro en la Kongresa Programo. Se hazarde nenia ĉambro publikigos en Kongreso-Programo, serĉu por anonco sur Kongresa anonctabulo.

**DEMANDARO - N-ro 1, Bulteno de Ateo, Aprilo 1988**

Titolo: S-ro___ S-ino___ F-ino___ D-ro___ alia___

Nomo:______________________________________________

Adreso:______________________________________________

______________________________________________

Telefonnumero (kun plena kodo por via areo):______________________________

Pseŭdonimoj uzotaj:______________________________________________

Ĉu oni rajtas aperigi vian nomon en eventuala adresaro de ATEO? jes___ ne___

Ĉu vi volas membriĝi en ATEO? jes___ ne___ eble___

Ĉu vi volas ricevi ateisman revuon? jes___ ne___ eble___

Kioma estus por vi justa membrokotizo (kiu inkluzivus abonon al revuo)?

______________________________________________

Kioma estus por vi justa abonkotizo sen membreco?______________________________

Ĉu vi loĝas en pagipova lando? jes___ ne___

Ĉu vi povas pagi en usonaj dolaroj? jes___ ne___

Se vi ne povas pagi, ĉu vi povus alirimede kompensi nin, ekz. per libroj aŭ gazetoj?

Jes, tiel:______________________________________________ ne___

Krom Esperanton, kiujn lingvojn vi uzas kaj komprenas?

______________________________________________

Ĉu vi uzas IBM-PC/XT/AT-kongruan mikrokomputoron? jes___ ne___

Se jes, kiujn tekstoprilabora(j)n softvaro(j)n vi uzas?

______________________________________________

Ĉu vi partoprenos la Universalan Kongreson en 1988? jes___ ne___ eble___

Ĉu vi estas ano de SAT? jes___ ne___

Ĉu ATEO restu neligita al UEA? jes___

Aŭ ĉu ATEO fariĝu ne-neŭtrala asocio ligota kun UEA? jes___

Bonvolu sugesti titolo(j)n por ateisma revuo:______________________________

______________________________________________

Ĉu vi volas kontribui novaĵojn au artikolojn por publikigo? jes___ ne___

se jes, tiajn:______________________________________________

Ĉu vi konas aŭ spertas historion de ateismo en Esperantujo? jes___ ne___

se jes, tian:______________________________________________

Ĉu vi havas bibliografiajn informojn pri ateisma literaturo en Esperanto? jes___ ne___

se jes, mi enmetos aŭ poste informos______________________________

Ĉu vi havas Esperantan ateisman literaturon kiun vi povus fotokopii kaj sendi kontraŭ rekompenso?

jes, mi havas:______________________________________________ ne ___

**Dankon. Bonvolu resendi ĉi tiun demandaron al:**
**Ralph Dumain; 1629 Columbia Road, N.W.; Apt. 615; Washington, DC 20009; USA**